

Christian Morgenstern,
La lupfantomo

tradukita de Bertilo Wennergren

Jen lupfantom' de famili'
meznokte iam kuris for
al tombo de la profesor'.
kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'
starante sur la kructabul'
dum lup' senmova kiel splinto
atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,
tra "lupfintomo", plej perfekta,
plu "lupfontomo", iom rara,
ĝis "lupfuntomo", ho, koŝmara.

Ĉi participoj plaĉis multe
al la fantomo, kaj rezulte
ĝi petis: "Legu plu el PIV-o
pri participoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:
"Jam fermis mi per fin' kaj amen,
ĉar netransiraj bestoj feblas
kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro
ja spertas pli ol eĉ vampiro.
La lup' revenis larmokula
al sia famili' ulula.

*Traduko de la Germana poemo "Der
Werwolf" de CHRISTIAN MORGENSTERN
(Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 -
†1914-03-31) en Esperanton de Bertilo
Wennergren.*

Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)

*Vidu la retejon [http://bertilow.com/
literaturo/lupfantomo.html](http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html).*

Christian Morgenstern,
The Werewolf

tradukita de Alexander Gross

A Werewolf, troubled by his name,
Left wife and brood one night and came
To a hidden graveyard to enlist
The aid of a long-dead philologist.

"Oh sage, wake up, please don't berate me,"
He howled sadly, "Just conjugate me."
The seer arose a bit unsteady
Yawned twice, wheezed once, and then was ready.

"Well, 'Werewolf' is your plural past,
While 'Waswolf' is singularly cast:
There's 'Amwolf' too, the present tense,
And 'Iswolf,' 'Arewolf' in this same sense."

"I know that—I'm no mental cripple—
The future form and participle
Are what I crave," the beast replied.
The scholar paused—again he tried:

"A 'Will-be-wolf?' It's just too long:
'Shall-be-wolf?' 'Has-been-wolf?' Utterly wrong!
Such words are wounds beyond all suture—
I'm sorry, but you have no future."

The Werewolf knew better—his sons still slept
At home, and homewards now he crept,
Happy, humble, without apology
For such folly of philology.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de CHRISTIAN
MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 - †1914-
03-31) en la Anglan de Alexander Gross.*

Arg-825-1657 (2013-02-13 18:39:45)

*Tiu ĉi angligo troviĝas en [http://bertilow.com/
literaturo/lupfantomo.html](http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html).*